

# Laŭokaza Novaĵletero

organo de la

**Internacia  
Komerca kaj  
Ekonomia  
Fakgrupo.**

Redakcia adreso :  
19 Cranbury Road,  
Eastleigh, Hants.,  
SO5 5HB,  
Britio.

Numero 26;

IKEF  
★  
1984

aprilo, 1989.

Laŭokaza Novaĵletero,

aprilo, 1989a.

## E n h a v o .

<u>paĝo</u>	<u>titolo(j)</u>	
2	Internacia Komerca kaj Ekonomia Fakgrupo.	
3	Administrado: Atentigoj pri la Jarkunveno.	
4	Raporto pri la agado de IKEF dum la jaro 1988; La Estraro.	
5	la sama - daŭrigo	
6	la sama - kompletigo Informilo pri Ĉina kaj Fremda Ekonomio.	
7	Letero al la Redaktoro;	J.-L. Texier.
8	La membraro estas petata voĉdoni;	F.-X. Gilbert.
9	la sama - desegnaĵoj	
10	Dukatoj kaj taleroj;	Karl Beckmann.
11	la sama - kompletigo	
12	Via redaktoro diras: Adiaŭ ! Teknike pri la LN-o.	Lorens' Mi.

### -----

#### Noto de la redaktoro:

Pro manko de spaco en tiu ĉi numero, pluraj novaĵeroj kaj atentigoj devis esti prokrastita ĝis proksima numero. Ni esprimas bedaŭron pro iu ĝeno kaŭzita per tio.



**Internacia Komerca kaj Ekonomia Fakgrupo.**  
Kunlaboranta faka asocio kun Universala Esperanto-Asocio.

## La Estraro:

S-ro Franz Josef Braun, Prezidanto kaj Ĝen. Sekretario  
S-ro Roland Rotsaert, Financa Konsilanto  
D-ro István Gether  
S-ro François-Xavier Gilbert  
S-ro Lawrence Mee  
D-ro Marco Picasso  
S-ro Seikó Yamasaki

Revizoro por la financa raporto:  
D-ro Gianfranco Polerani

Centra sidejo (provizora):  
Hornisgrindestrasse 8,  
7580 Bühl 16, Okc.-Germanio.

Financa sidejo:  
Visspaanstraat 97,  
8000 Brugge, Belgio.

Redaktoro, Laŭtokaza Novaĵletero:  
- provizore ĉe la Centra  
Sidejo:  
Hornisgrindestrasse 8,  
7580 Bühl 16, Okc.-Germanio.

Prizorganto, presado-ekspedado:  
S-ro F.-X. Gilbert,  
Vert Coteau,  
Longeville-en-Barrois,  
55000 Bar-le-Duc, Francio.

-oOo-

**Internacia Komerca kaj Ekonomia Fakgrupo.**

Pagoj -- Perantoj -- Kotizoj

Ciuj landoj: Baza kotizo: 400 belgaj frankoj aŭ 20 nederlandaj guldenoj.  
Dumviva membreco: unu-foja pago egala al 20-obla baza kotizo.

Poŝtekkonto belga, (Bruselo):  
n-ro 000-1592629-83  
je la nomo de IKEF, p.a. R. Rotsaert,  
Visspaanstraat 97, 8000 Brugge, Belgio.

Konto ĉe Universala Esperanto-Asocio,  
Rotterdam, Nederlando,  
je la nomo de Internacia Komerca kaj  
Ekonomia Fakgrupo, Belgio.

## Perantoj:

Francio  
S-ro F.-X. Gilbert,  
Vert Coteau, Longeville-en-Barrois,  
55000 Bar-le-Duc. (CCP1275-89 L Nancy)

Okc.-Germanio Kotizo: 20 markoj.  
S-ro F.J. Braun,  
Hornisgrindestrasse 8,  
7580 Bühl 16.  
(Volksbank Bühl 713120 - BLZ 662914000)

Jugoslavio  
S-ro S. Taleski,  
ul. 'Oslo' br. 12,  
91000 Skopje.

Nov-Zelando Kotizo: 20 dolaroj.  
S-ro J.C. Rapley,  
P.O. Box 70-038,  
Ranui, Auckland 8.

Hungario  
S-ro J. Horvath,  
Varsányi Irén u. 8,  
1027 Budapeŝt.

Togolando  
S-ro Koffi Gbeglo,  
B.P. 13169,  
Nyékonakpoé, Lomé.

Italio  
D-ro M. Picasso,  
via De Gasperi 7,  
20057 Veduggio al Lambro.

**ADMINISTRADO.**

**Grava atentigo al niaj membroj:**

1. La Estraro prezentas sian raporton pri la agado de  
I K E F dum la jaro 1988, kaj proponas akcepton de tiu  
raporto;

2. La Estraro prezentis jam en LN n-ro 25 la financon  
raporton por la jaro 1988, notante, ke la ciferoj de la  
raporto estas prezentitaj en bona tempo al la kontrolo de la  
revizoro. D-ro Polerani juĝis ilin bonaj kaj en ordo. La  
Estraro tiel proponas akcepton de tiu financa raporto;

3. La Estraro notas, ke okazis deficito en la sumo de  
8 947 belgaj frankoj, kaj proponas likvidon de tiu def-  
icito per eluzo de parto de la kapitalo.  
Notante la sumon de la financa deficito, la Estraro  
tamen atentigas, ke adekvata kapitalo restas por subteni mas-  
trumadon dum almenaŭ unu plia jaro, sen ŝanĝo en la nivelo de  
membro-kotizoj;

4. La estraranoj D-ro Gether, S-ro Gilbert, S-ro Mee, S-ro  
Rotsaert kaj S-ro Yamasaki, ĉiuj elektitaj dum nia  
Generala Kunveno en Varsovio, 1987, baldaŭ estos du jaroj  
en sia ofico. Laŭ la Statuto de IKEF, alineo 7.1 dua frazo,  
estrarano tenas sian oficon dum du jaroj. Do, ilia Estrar-  
aneco finiĝas ĉi-jare. En la nomo de IKEF, la Prezidanto  
dankas al ili pro la laboroj faritaj dum la pasintaj du  
jaroj.

Ilia re-elekto eblas. Escepte de S-ro Mee, ili ĉiuj  
pretas denove kandidatiĝi. La Estraro rekomendas al la  
membraro re-elekton de D-ro Gether kaj S-ro Gilbert, S-ro  
Rotsaert kaj S-ro Yamasaki.

5. Nia Statuto, alineoj 7.4 kaj 8, montras la procedon pri  
aprobo kaj de la raporto pri agado kaj de la financa  
raporto, kaj pri elekto de estraranoj. Ĉi-jare, ni denove  
aranĝas Generalan Kunvenon por nia membraro, kadre de la Un-  
iversala Kongreso en Brajtono, Britio. Diskutado pri kaj  
aprobo por la raportoj, (vidu punktojn 1 - 3), kaj elekto de  
estraranoj, (vidu punkton 4), okazos tie. Membroj, kiuj ne  
povos veni al Brajtono, rajtas skribi komisiin alian membron  
ĉeestontan, pri aprobo kaj voĉdonado, kaj tiun agon la Estr-  
aro rekomendas.

En la nomo de la Estraro,  
Franz J. Braun,  
Generala Sekretario.  
1989-03-28.



## RAPORTO PRI LA AGADO DE IKEF DUM LA JARO 1988.

### Membraro denove kreskis.

Dum la jaro 1988, la membraro denove, sed nur malforte pligrandiĝis, nome de 67 membroj komence de la jaro, al 74 je la jarfino. Inter ili estas du Dumvivaj Membroj, S-roj Mee (IKEF 2) kaj Voit (IKEF 17). La 74 membroj loĝas en 25 landoj. Je la unua rango laŭ membronombro estas Okc.-Germanio kun 11 membroj; je la dua rango, surprize, estas Suda-Koreio kun 9 membroj.

La nombro de Perantoj reduktiĝis je du al sep. Demisiis la Perantoj Han en Suda-Koreio, kaj Foss en Britio, tiel ke la du postenoj momente vakas. La restaj 7 Perantoj situas en Francio, Okc.-Germanio, Hungario, Italio, Jugoslavio, Novzelando kaj Togolando. Necesos serĉi novajn perantojn en landoj kun sufiĉe granda membronombro, t.e. en Nederlando, Britio, Belgio, Suda-Koreio kaj Japanio.

### IKEF fariĝis "Kunlaboranta faka asocio kun UEA."

Dum la U.K. en Roterdamo, la Komitato de UEA pozitive decidis pri nia kunlabora kontrakto; per tio, IKEF fariĝis "Kunlaboranta faka asocio kun UEA". Do, grava paŝo por IKEF estas farita.

Ĉe tiu okazo ni povas ĝoje rimarki, ke dum tiu jaro la nomo de IKEF ofte estis menciita en diversaj Esperantistaj revuoj kaj dum elsendoj per radio.

### Ĝenerala Kunveno 1988, Roterdamo.

La Ĝenerala Kunveno de IKEF-membroj okazis kadre de la 73a Universala Kongreso de Esperanto en Roterdamo je la 25a de julio, 1988. Ĝi elvokis grandan intereson ĉe la ekonomikista Esperantistaro. Krom 17 IKEF-membroj ĉeestis 23 interesitoj, kiuj vigle kundiskutis. La Estraranoj Braun, Gilbert, Mee kaj Rotsaert gvidis la kunvenon kaj diskutadon.

Plia grava aranĝo okazis dum la kongresa semajno per vizito al la Komerca Ĉambro en Roterdamo.

Multaj meritoj gajnis ĉe tio nia membro Kees RUIG (IKEF 68), kiu tradukis la prelegon de S-ro Landmann pri la taskoj de lia Komerca Ĉambro, kaj pri la graveco de la haveno Roterdamo por la nederlanda ekonomio, el la nederlanda lingvo Esperanten, kaj same lerte funkciis kiel interpretanto de la vigla diskutado dum la demandhoru. Tio estis bonega demonstrado pri la praktika utilo de Esperanto.

Alia kunveno. Ĉi-foje inter germanaj IKEF-membroj, okazis fine de oktobro en la urbo Aalen, en Okc.-Germanio. Tie oni pridiskutis en la ĉeesto de Akademiano Werner Bormann (IKEF 27) pri ĝusta kaj multefika vojo al nia terminika laboro.

### Terminika laboro malrapide progresas.

La Estraranoj Braun, Gilbert kaj Rotsaert vizitis je la 14a de junio la Internacian Komercan Ĉambro en Parizo, Francio, por tie priparoli kun la koncernataj personoj la eblecon eldonigi la terminaron, *Key words ...*, (Slosilvortoj ...) eldonita de IKC, aldone kun Esperanto kiel sesa lingvo. Kvankam ni ne atingis tujan sukceson, la responsaj sinjorinoj de IKC pripensis la intencon eldoni la terminaron kun aziaj lingvoj kaj Esperanto. Ni ofertis al ili, ke membroj niaj povus plenumi tiun taskon, kaj kiel pruvo, post mallonga tempo, ni surprize por ili prezentis paĝon 48 kun la nocioj n-roj 177 ĝis 188, en la lingvoj rusa, (farita de D-ro Gether, Hungario), ĉina, (farita de S-ro Lee, Hongkongo) kaj japana, (farita de S-ro Yamasaki, Japanio).

Intertempe, ni daŭrigas nian traduklaboron pri *Key words ...*, kun S-ro Wiersch (IKEF 19) kiel centro, kaj espereble ni povos fini la ankoraŭ necesan reviziadon dum 1989. Eĉ se la IKC ne pretas

### Raporto pri la agado de IKEF, 1988 - daŭrigo.

noveldoni sian terminaron kun Esperanto, tiu laboro ne estus senutila, ĉar unue ni mem lernis multe per tio, kaj due, la DSO-kompanio bezonas tiujn terminojn por sia projekto DLT, (aŭtomata tradukado surbaze de Esperanto kiel pontlingvo), kaj same ankaŭ Ak-ano Eichholz en Kanado bezonas la terminojn por sia projekto PeKoTeKo, (PerKomputora Termin Kolekto).

### Herka agado.

La nombro de artikoloj verkitaj de IKEF-anoj por la revuo MONATO estas proksimume samnivela kiel lastjare. Ni volas ripeti nian alvokon en lastjara jarraporto, ke niaj membroj abonu MONATO-n - internacian magazinon sendependan por politiko, ekonomio kaj kulturo - ĉar ĝi estas nia ĉefa podio kaj bazo por prezenti fakajn artikolojn.

Bedaŭrinde, ankaŭ en la jaro 1988 ni ne sukcesis plialtigi la nombron de pagitaj reklamanoncoj, flanke de firmaoj, en MONATO. Vi ja ĉiuj scias, ke ni gajnas 15 procento de makleraĵo por nia kaso. Tiaj reklamanoncoj estas ĉiurilate tre utilaj.

Menciindas, ke nia membro D-ro Goldman (IKEF 52) regule dum la jaro eldonas sian "Ekonomian Bultenon pri Usono". Ni rekomendas al vi la abonon de tiu kvarpaĝa bulteno.

Meritas laŭdon ankaŭ la revuo FOKUSO, popular-sciencia serio de Hungara Esperanto-Asocio. Ĉe tio efike kunlaboras la Ekonomikista Grupo de HEA, (EKOESP), niaj membroj (IKEF 24). En FOKUSO videblas ĝojige granda nombro de reklamanoncoj, ĉefe de hungaraj firmaoj. Ni varme rekomendas al vi la abonon de FOKUSO. En ĝi vi povas ankaŭ prezenti artikolojn pri ekonomikistaj temoj.

### Esperanto en komerca lernejo.

En la "Instituto por trejnado de vendistoj", komerca lernejo de

la Komerc- kaj Industrio-Ĉambro Bar-le-Duc, Francio, komenciĝis provo pri deviga lernado de la internacia lingvo, Esperanto. La iniciaton por tio prenis nia estrarano S-ro Gilbert, Direktoro de tiu Ĉambro. Tri fazoj estas planitaj por la lernado. Post la unua fazo, la gejunuloj devas skribi al korespondantoj. Tiu-ĉele, S-ro Gilbert akiris 14 IKEF-anojn kiel korespondantojn. Por subteni tiun iniciaton, kuraĝigi la responsulojn kaj ricevi pliajn informojn, bonvolu rekte alskribi la direktoron de la *INSTITUT DES FORCES DE VENTES*, 8 parc Bradfer, 55000 Bar-le-Duc, Francio.

### La Laŭokaza Novaĵletero.

Nia komunikilo, la Laŭokaza Novaĵletero, aperis dum la jaro 1988 denove 6-foje, t.e. laŭplane, kompare kun nur tri-foje en la ĵus antaŭa jaro. Pri tio meritas laŭdojn unue la redaktoro, S-ro Mee, kiu fervore klopodas plenigi la paĝojn eĉ sen sufiĉaj kontribuoj el la membraro, kaj ankaŭ S-ro Gilbert, kiu transprenis la taskon pri kopiado kaj forsendado.

Kompreneble, la kostoj pro 6-foja preparo en Francio estas pli altaj ol pro 3-foja preparo en Hungario en 1987. Bonvolu kompari la tiurilatatajn ciferojn kaj atentigojn en la financa raporto, 1988, de S-ro Rotsaert, aperinta en LN n-ro 25.

Ene de la Estraro ni pridiskutadas dum ĉi tiuj semajnoj la eblecojn pri plibonigo de la aspekto je elteneblaj kostoj. Se vi havas ideon pri tio, bonvolu sciigi ĝin per letere al mi.

### Kunlaboro kun Ĉinio.

Tiel ni povas superskribi ĉi tiun alineon. Ĉar trifoje ni povis legi en la LN dum la jaro 1988 pri tiuj agadoj.

Nia estrarano D-ro Picasso partoprenis dum aŭgusto la Duan Internacian Konferencon de la Ĉina Akademio de Scienco, en Pekino. Al



Raporto pri la agado de IKEF, 1988 - kompletigo.

Ili oni eĉ aljuĝis tie la premion, "Verda Kosmo", pro elstaraj kontribuoj en scienco.

Alia estrarano, nome la Prezidanto, S-ro Braun, faris profesionan vojaĝon al sudorienta Azio, kaj ankaŭ al Hongkongo kaj Ĉinio. Kune kun sia partnero el Kongkongo, S-ro Lee (IKEF 11), li vizitis la Specialan Ekonomian Terenon, Shenzen; ĉe tio ili uzis la internacian lingvon dum negocado kun ĉinaj produktistoj.

Fine estas rimarkinde, ke sub Scienco-Teknika Esperanto-Asocio, (STEA), Beijing (Pekino), estis fondita "Ekonomio-komerca sekcio". Ni kontaktiĝis perkoresponde kun tiu grupo, kaj proponis al ĝi kunlaboradon, (t.e. reciproka informado, komunaj agadoj kaj simile).

#### Resumo; estonteca perspektivo.

Traleĝinte la lastan, resuman, ĉapitron de la jarraporto 1987, ni povas konstati, ke ĝi grandparte ankoraŭ validas kaj ripetindas.

"Kvanto kaj kvalito de agadoj ĝenerale kreskis; ankaŭ ne-estraranoj disvolvis pli da aktivecoj, tamen kompare kun la nuna relative granda membraro, kaj pensante pri la celitaj taskoj starantaj antaŭ ni, IKEF devas evoluigi pli da dinamismo.

"La intereso de la Esperantistaro pri IKEF plialtiĝis, kaj ankaŭ tiu de la ekstera mondo. La grundo por plia sukceso estas fekunda. Ni devas nur diligente prilabori ĝin, por havi poste riĉan rikolto. Do, la perspektivoj entute ŝajnas esti favoraj."

Laŭ decido de la Estraro,  
Franz J. Braun,  
Prezidanto.  
1989-03-28

#### INFORMILO pri Ĉina kaj Fremda Ekonomio.

Nia Prezidanto ricevis informleteron el Ĉinio, kaj ĝin transdonis al la Redaktoro kun peto baldaŭ aperigu ĝin, se iel eblas.

Certe, la enhavo de la informfolio estas grava por tiuj komercistoj en la aparta kampo de negocado kun Ĉinio, kaj volonte ni akceptis la peton. Sed tiu informletero estas tro longa kaj tro dense tajpita por ebligi simplan responon. Ni do re-verkas la esencajn informojn, jene.

"La Informfolio pri Ĉina kaj Fremda Ekonomio, (ICEF), estas ekonomio-informa gazeto kiu aperas, ekde 1988, tri-foje en la monato, kaj celas aperigi ekonomikomercajn informojn pri Ĉina por la cetera mondo. Samtempe, kaj laŭeble, la Informfolio celas komuniki ekonomiajn informojn pri la internacia merkato por ĉinaj entreprenoj.

"La redakcio volas regule oferti ICEF al interesatoj en aliaj landoj, kaj establi interŝanĝajn rilatojn kun tiuj instancoj. Aparte, la redakcio pretas akcepti servo-petojn komercajn, aperigi reklamanoncojn, kaj okazigi ekspoziciojn kaj informanconajn kunvenojn. En ĉio, ICEF volas utiligi la internacian lingvon, Esperanton.

"Ĝis nun, la gazeto aperas ĉefe en la ĉina lingvo kun fojaj tradukoj en la angla lingvo, sed ekzistas eblecoj utiligi aliajn lingvojn, en la formo de tradukoj en Esperanto, la angla, franca, germana, rusa kaj japana lingvoj.

"Jam dum mallonga ekzisto, la redakcio establis kontaktojn kun kelkaj miloj da entreprenoj, kaj la Informfolio akiris tre favorajn efikojn de la ĉina kaj eksterlanda ekonomia rondo. La redakcio pretendas, ke ĝi jam sukcesis fondi bazan sistemon de abundaj informfontoj."

Tiel, la esencaj informoj pri informfolio, kiu, bedaŭrinde, ne estas legebla far nia redakcio: la specimena kajero estas tute en la ĉina lingvo.

Sendube nia membraro volas proponi ĉian eblan subtenon por tiu ĉi nova iniciato. Nia peto al vi estas: Faru skribajn petojn al:

S-ro Cen San Koralo,  
Informilo pri Ĉina kaj Fremda Ekonomio,  
Xi'an Zhonglu N-ro 62,  
Chendu 610072, Ĉ i n i o.

#### Letero al la Redaktoro.

de: S-ro Jean-Louis Texier, Francio.

Komerco estas aparta okupo, kiu preskaŭ ne rajtus la titolon "fak-okupo" pro la fakto, ke ĝi fakte estas ĉiam profesio, kaj celas, (almenaŭ tio estis ĉiam reala por mi), alporti buteron kaj panon.

Mi miras, ke aperas en nia bulteno nomoj, kiujn mi ne konas ... kaj pri kiuj, la rilatoj al komercado estas por mi nebulaj. Se la celo de komerca fako estas ne nur fariĝi amikaro de fakuloj ... sed estontece meti Esperanton sur la ilaron de la novaj generacioj ... mi ŝatus, ke ĉiuj el ni, interŝanĝantoj, legantoj ... sciu pri la rolo en la komerco de la alparolantoj. Ĉu, do, al vi, (la Redaktoro), aŭ al responenta Estrarano, eblus decidi, ke, ie parenteze en la bulteno oni signu la profesion de la aluditaj aŭ subskribantaj homoj? Ankaŭ oni confirmu, ĉu la homo estas 'laboranto', aŭ 'emerito' ... ?

Sen tio, kiamaniere iam venos al ni la ebleco sugesti en niaj propraj firmaoj, aŭ okaze de renkontoj profesiaj, ke Esperanto povus utili por tiu, aŭ tiu alia oportuno? Mi kuraĝas konfesi, ke miaj samprofesianoj ĉiutage defendas apud mi alian "plurnacian" lingvon ... ke mia fabrikestro irus al katastrofo, se li decidus morgaŭ korespondi tutmonde nur en Esperanto ...

Tamen, mi, por tiel diri, fosas regule la sulkon per ekzemploj, ekzemploj ... pri la avantaĝoj de Esperanto por turistoj ... mi esperas, ke iam mi povos montri nian bultenon en kiu, sub la subskriboj, aperos la komercaj postenoj de la subskribantoj ... "teknikisto pri nutraĵvendado en Skandinavio", "revendanto de aziaj silkaĵoj", "aĉetanto en komputilfabriko" ... aŭ simile.

Ĉu la sliparo de la IKEF-membroj havas jam tiujn informojn pro ĉiu unuopulo? Ĉu oni scias pri emeriteco de niaj anoj? Ĉu ne utilis decidi, ke oni permesos al la redaktanto komuniki la profesiojn? Ankaŭ, (pardonu al mi), la aĝo de la homoj estas signo pri la eksperimento-kapablo, aŭ la juneca modernismo?

Subskribis la leteron:

Jean-Louis Texier, (55 jaraĝa),  
nun regiona vendodirekto en aroma  
industrio ĉe franca landa klientaro.

Via Redaktoro hastas atentigi legantojn pri tio ĉi, ke la uzo de la signo ' ... ' ne estas spuro de ruĝa kraĵo, sed kopiado de la skribmaniero de S-ro Texier.

En responda letero al S-ro Texier, ni proponis la starigon de aparta rubriko en ĉiu kajero, kun la titolo, Pri niaj aŭtoroj, kaj petis aprobon de la ideo. S-ro Texier rapide respondis, kaj ŝajne preferas, ke la aludo estu apude al la artikolo, kvankam li ne malaprobas la ideon de aparta rubriko. Ni presas nun citaĵojn el tiu dua letero, kaj petas reagojn de la membraro.

... eltiraĵoj en komercaj verkoj aŭ gazetoj ... ofte ne estas bone kompreneblaj, se oni ne scias en kia industrio laboras la subskribanto, kaj en kia rolo. ... tio estas des pli atentiginda inter diverslandaj komercfakuloj. ... Ne devus ĝeni la aspekton de la bulteno, se ĉiufoje kiam temas pri artikoloj kiuj rilatas al komerco, oni (eble mallongige) memorigu la profesion de la verkinto. ...

... (mi proponas) "mallongigojn kiuj respondus inter aliaj al la jenaj:

vendosekto, aĉetsektoro, informsektoro, reklamsektoro,  
inĝeniero, komerca lernejo, ... (kun ĉi-foja subskribo:)

J.-L. Texier (vendosektoro - aroma industrio).



## La membraro estas petata voĉdoni ...

Dum kelkaj monatoj nun, kiel menciita en la Raporto pri la agado de IKEF dum la jaro 1988, la Estraro, per perleterita interŝanĝado de opinioj, provis veni al decido pri, inter aliaj ideoj por plibonigo, nova emblemo por la Fakgrupo.

Frue dum la diskuto, nia Prezidanto invitis ne nur opiniojn pri la preferata desegno inter la unuaj 14, sed invitis ankaŭ eĉ freŝajn desegnojn, se iu membro volis iun proponi. Post kelkaj opinisondoj pri la entute 25 desegnoj, voĉdonado lastatempa en la Estraro montris preferojn por tri el ili. La Estraro tiam decidis, ke definitiva elekto por nia estonta emblemo estu farota de la tuta membraro el inter tiuj tri proponoj.

Apude aperas desegnaĵoj de tiuj tri proponoj. La Estraro ordonis al la Redaktoro verki alvokon al la membraro, partopreni en la voĉdonado.

Ciu membro havas unu voĉon en la elekto, kaj estas petata utiligi la ŝancon sciigi sian preferon, por ke la fina elekto vere estu la elekto de la plej multo de niaj membroj.

Sciigu vian preferon, ni petas, per letero aŭ poŝtkarto al nia estrarano kaj Peranto por Francio, S-ro F.-X. Gilbert.

Verŝajne ne necesas aldoni, ke ju pli frue vi sciigos vian preferon, des pli frue S-ro Gilbert povos prezenti la rezulton.

Sajne utilis aldoni kelkajn vortojn pri la tri proponoj.

Desegnaĵo A donas ŝancon por tiuj membroj, kiuj pensas, ke neni nova emblemo estas bezonata; ĝi estas kombino de du partoj de la nuna kovrilpaĝo por la Laŭokaza Novaĵletero.

Desegnaĵo B donas ŝancon por tiuj membroj, kiuj volas vidi pli modernaspektan emblemon. Ĝi estas proponita de nia membro, S-ro Seesink, Nederlando, kaj en la fina stadio, la kvar linioj de la desegnaĵo estus diverskoloraj; la vertikalaj vortoj en la linioj estas internacia komerca kaj ekonomia fakgrupo.

Desegnaĵo C donas ŝancon por tiuj membroj, kiuj volas vidi novan emblemon sed tamen preferas resti pli-malpli en la tradicio de Esperanto. Ĝi reprezentas la bastono de Merkurio inter la duobla E de Esperanto, kaj estas kombino de proponoj de S-ro Ruig, Nederlando, kaj S-ro Rotsaert, Belgio.

La Estraro volas esprimi dankojn al la pluraj membroj, kiuj faris proponojn, kaj emfazas, ke inter la aliaj desegnaĵoj estas pluraj, kiuj havas apartajn meritojn. Elekti la plej generale favoritaj estis malfacila tasko.

La adreso por via poŝtkarto aŭ letero estas:

S-ro F.-X. Gilbert, IKEF,  
Vert Coteau, Longeville-en-Barrois,  
55000 Bar-le-Duc, Francio.

## Desegnaĵoj por nova emblemo.

A

Internacia  
Komerca kaj  
Ekonomia  
Fakgrupo

IKEF  
★  
1984

B



C





## Dukatoj kaj taleroj.

Karl Beckmann.

Oni apenaŭ povas nei, ke la mono apartenas samtempe al du tre malsimilaj mondoj, nome al la prozeca mondo de materia ekonomio, kaj ankaŭ al la spirita mondo de fantaziema poezio. Aŭ ĉu vi vere povus aserti, ke ĉe aŭdo aŭ lego de la vorto 'dukato' vi pensas nur pri monero de difinita granda kaj pezo; ke ne vibretas, kiom ajn vage, ankaŭ romantika, revema kordo en via animo?

Eĉ en sobra, artefarita help-lingvo, esprimo kia 'or-monero' ne povus taŭge anstataŭi la vorton 'dukato', ĉar mankus io esenca, kvankam el materia vidpunkto 'or-monero' devus en preskaŭ ĉiu okazo sufiĉi. Sed la konata fabelo pri la azeno, kiu - dece esprimite - 'produktas' dukatojn ĉe ĝuste formulita magia ordo, perdis senteble de sia ĉarmo, se la rakontanto parolus pri nura 'mono' aŭ simile.

Jen la kaŭzo, kial la ora dukato kaj la arĝenta talero troviĝas en la oficiala, ne malhavebla vorttrezoro de nia internacia lingvo. Plue, la mistera flava metalo interligiĝas en nia fantazio tuj kun aventure strangaj scenoj, memorataj el historiaj anekdotoj aŭ romanoj. Ni ofte legis pri grafoj, reĝoj aŭ aliaj alt-rangaj personoj, kiuj kavalirece rekompencis iun humilan servon per diskrete donata dukato, aŭ en sama maniero mildigis senkulpan mizeron. Aliaj memoroj temas, ekzemple, pri ambiciaj kanajloj, kiuj dungis iun profesion murdiston per rulaĵo de brilaj dukatoj, por malaperigi kontraŭulon aŭ por akiri heredaĵon.

Konforme al la milda, relative modesta karaktero de la lun-lumeca arĝento, la talero ludas malpli arogan rolon. Ĝia sfero estas tiu de la honestaj burĝoj, de la malgrandaj friponoj, ankaŭ de tiuj infanoj, kia, ekzemple, la kompatinda knabino, forpelita de la malica duonpatrino en frostan, vint-ran nokton, kaj al kiu falis tie de la ĉielo miloj da steloj en la konvena formo de kontantaj taleroj.

Dukatoj kaj taleroj apartenas al la pasintaĵo. Certe, oni stampas ilin ankoraŭ; oni povas aĉeti radiante novegajn en ĉiu bankfilio, sed ili ne plu estas kalkulaj monunuoj; ili servas nur kiel ornamaĵoj, kiel nobla formo de mondonaco, aŭ kiel espereble konstanta ĝparvaloro.

Dukatoj kaj taleroj estas, do, precipe historiaj monspecoj, sed ili ne estas la plej antikvaj el la ankoraŭ populare konataj. La sobra brita 'pundo', ekz., rajtas postuli multe pli grandan respekton pro sia aĝo, kaj la jugoslava 'dinaro' kun la greka 'drakmo' tiel nomiĝas pro eĉ klasike antikvaj moneroj.

Tamen, eĉ en tiu nova perspektivo, la dukato kaj la talero povas sufiĉe imponi ankaŭ per sia historio. La dukato interesas, krome, per sia aparta rolo en la ekonomia evoluo de Eŭropo. Ĝia origino estas strange, preskaŭ surprize, analoga al sia - kiel montrite - forte romantika, foje eĉ diableca kariero. Ĉar ĝi naskiĝis, kvazaŭ infano de giganta komerca konkurenco, en kiom eble plej romantika, kulture kaj pejzaĝe plej unika loko, nome en Venecio.

Por kompreni tion, estas necese returnrigardi, malproksimen, al la epoko de la pereanta Roma Imperio. Tiam ankaŭ la eŭropa civilizo preskaŭ tute malaperis, kaj kune kun ĝi malaperis - almenaŭ en la ĉiutaga vivo - la ora mono. Pri tiu fenomeno la nuntempa, krizosperta generacio apenaŭ miros.

Pasis la frua Mezepoko, ses jarcentoj dum kiuj la homoj de la okcidenta mondo praktike neniam vidis oran moneron. Oni kalkulis la prezojn de la malmultaj varoj precipe per 'pundoj' de po ducent kvardek arĝentaj, (poste ankaŭ eĉ nur kupraj), pfenigoj, ('pencoj'), kiel oni faris ankoraŭ - ĝis antaŭ nelonge - en konservativa Britio.

Kiam fine la civilizo malrapide re-leviĝis, unue kaj plej vigle en norda Italio, tiam re-ekprosperis ankaŭ la internacia komerco - eminenta heroldo de la moderna epoko. Kreskanta komerco bezonas

Dukatoj kaj taleroj. kompletigo

kaj cirkuligas kreskantajn sumojn da mono. Manipulate en arĝentaj moneroj, tiuj sumoj fariĝis penige pezaj, tre malkomfortaj. La evoluo estis matura por la re-enkonduko de ora mono, kiu kunigas la oportunecon de nur frakcia pezo kun tiu de pli konstanta valoro.

En la urba ŝtato de Firenze, (Florenco), oni komencis stampi la novajn monerojn, kiujn oni tial nomis 'florenoj', (en germanlingvaj landoj ankaŭ 'guldenoj', kio simple signifas 'el oro'). Ni ĉi tianke rimarkigu, ke la mallongigita iterparo 'fl', (fo-lo), validas ankoraŭ por la nederlanda guldeno, kaj ĝis la fino de la pasinta jarcento ĝi validis ankaŭ por la aŭstria guldeno, kvankam, jam delonge degenerinte, ĝi konsistis, paradokse, nur el arĝento kaj nomiĝis tial, eĉ oficiale, 'Silbergulden', t.e. laŭvorte: 'arĝenta or-ulo'.

Ankaŭ en la hungara lingvo, kiu multe emas konsiderinde adapti pruntitajn vortojn al siaj propraj son-kutimoj, ni ekkonas ke la hodiaŭa 'forint' estas ĝuste nia familia 'florenoj' - kompreneble ne laŭ-materiale sed nur laŭ-nome.

Ke la facile manipulebla florenoj, egalvalora kun la peza pundo de 240 pfenigoj, rapide populariĝis en pli kaj pli vasta cirkuladot, tre profitiga por sia hejma Firenze, tiu fenomeno vekis kaj instigis la envidon de la jam menciita, plej impona komercista respubliko, kiu kiam ajn ekzistis: nome de Venecio!

La venecianoj devis imiti la ekzemplon en la intereso de sia financa kaj politika nimbo. Do, trionjarcenton poste, ili stampis propran, egalvaloran or-moneron, kiu efike konkurencis la florenojn. Tio okazis ducent jarojn antaŭ la vojaĝo de Kolumbus, kiam Rudolfo, la unua habsburga reĝo, ankoraŭ vivis. Por klarigi la nomon de la nova venecia monero - dukato - ni devas memorigi, unue, ke la tiama rang-ordo de la ŝtatoj nomis venecion 'duklando', al kies ŝtatestro apartenis la titolo 'duko', (aŭ, en venecia dialekto, 'doge'), kaj due ni memorigu, ke tiu duklando ĉiam lerte kombinis sian tre

realan - eĉ materialisman - vivosenton kun pia religio. Tiu du faktoj komprenigas la vortojn ĉirkaŭ la figuro de Kristo stampita sur la monero: "Al vi, Kristo, estu donita, ĉi tiu, de vi regata, duklando". La lasta vorto, en sia originala, sed mallongigita latina formo, 'DUCAT', estis tiom okulfrapa, ke ĝi fariĝis eksterlande la nomo de la tuta monspeco, kiun la venecianoj mem nomis 'zeczino', (en Esperanto: 'zekino', plua vorto familiara al amikoj de historia beletro kaj pruntita el la oriento, el la araba lingvo).

Precipe la mezeŭropaj landoj, de Hungario ĝis Nederlando, amase imitis la venecian dukaton, dum ses jarcentoj, ofte ŝanĝante la figuraĵojn kaj la skribon, sed neniam esence la pezon aŭ la karatojn, (t.e. la enteno da oro).

Formas kontraston al tiu unike konstanta valoro de la dukato, ke la valoro de la arĝenta talero ofte kaj multe variis. Kiel jam aludite, ankaŭ la florenoj populariĝis trans la limoj de sia patrujo, kaj precipe en la regiono ambaŭborde de la Rejno. Tiun reĝan florenojn aŭ guldenojn oni anstataŭigis, unue en Tirolo, poste ankaŭ en aliaj landoj, per egalvalora monero el arĝento. La plej grandajn nombrojn de tiu arĝenta 'guldenoj' oni stampis en la mineja urbo Joachimsthal en la nordo de la tiama Bohemio, (nuntempe: Ĉeĥoslovakio), ĉar tie grandegaj tavoloj de arĝenta minaĵo estis ĵus malkovritaj. Kaŭze de tiu cirkonstanco, la esprimo, 'Joachimsthaler', en la senco de 'joachimsthala guldeno', mallongigita 'Thaler' - talero - fariĝis la nomo de tiu bela, impone granda kaj dika moner-speco.

Fine ni rimarkigu, ke la talero post malgranda transformiĝo de vortsono kaj de skribmaniero, do kiel 'dolaro', ankoraŭ facile rekonebla, reprezentas la plej ŝatatan pagilon kaj la plej ofte uzatan valor-normon de la hodiaŭa mondo.

- - - - - oOo - - - - -

Represita kun permeso el teksto uzita dum elsendo de Radio Vieno, je la unua de januaro, 1989.



Via redaktoro diras: Adiaŭ !

Kiam mi surprenis, por la dua fojo, la taskaron esti Redaktoro de la Laŭokaza Novaĵletero, mi akceptis ĝin kun la supozo, ke ĝi estos iom daŭra posteno. Malfeliĉe, la sorto dekretis alion.

Tiu ĉi kajero, la sesa sub mia deĵorado, estas la lasta el mia plumo. La spertoj dum la lasta jaro pruvis al mi, ke IKEF bezonas pli kompetentan ol mi verkiston transpreni la taskon kunmeti la tekstojn post svingado de la ruĝa kraĵono de redaktoro.

Mi, do, libervole demisias el la posteno, transdonante senrezerve la postenon je la dispono de la Estraro.

Sendube mi daŭrigos mian verkadon de artikoloj kaj eseoj; mian kunordigadon de la laboroj kunmeti interetnan vortaron de ordinara Esperanto, kaj mian komputadon de la kurzoj de la Stelo. Pri tiuj aktivecoj, kaj pri miaj laboroj kiel Kasisto de la Skolta Esperanto-Ligo, vi plej eble foje legos, ĉu en la paĝoj de la organo de IKEF, ĉu aliloke.

Al ĉiuj pluraj membroj de IKEF, kiuj per proponado de artikoloj kaj leteroj ja plifaciligis, kvankam foje iom stumbligis, mian iradon survoje al la celo, eldoni legindan organon, mi esprimas tre sincerajn dankojn. Al ĉiuj membroj de IKEF mi proponas korajn salutojn. Al la nova redaktor(ar)o, mi promesas iun bezonatan helpon, laŭ mia povo kaj konforme al esprimota deziro.

Lorens' Mi.

### *Teknike pri la Laŭokaza Novaĵletero.*

Respondeca redaktoro por tiu ĉi kajero de la Laŭokaza Novaĵletero estas S-ro L. Mee, ĉe la Redakcio adreso:

19 Cranbury Road,  
Eastleigh, Hants.,  
SO5 5HB, Britio.

Eldonanto de la Laŭokaza Novaĵletero estas Internacia Komerca kaj Ekonomia Fakgrupo, ĉe la provizora ĉefsidejo:

Hornisgrindestrasse 8,  
7580 Bühl 16,  
Okc.-Germanio.

La Redaktoro kaj Eldonanto aperigas subskribitajn artikolojn sen aŭtomata akcepto de respondeco por opinioj tie esprimitaj.

La rajto de represado estas malferma al ĉiu ajn persono aŭ instanco, kiu tiun rajton volas preni, kondiĉe nur, ke la fonto estu klare indikita.

La limdato por ricevo de materialo por la proksima kajero estas sabato, la 15a de junio, 1989, en Bühl, Okc.-Germanio.

La Laŭokaza Novaĵletero akceptas mendojn por anoncoj kaj anoncetoj, de membroj aŭ instancoj.

Membroj de IKEF havas la rajton peti aperigon de anonceto sen ia devo pagi la koston. Ne-Membroj de IKEF rajtas peti aperigon de anonceto kontraŭ tre modesta tarifo. Petu detalojn de la Financa Konsilanto en Belgio.

Reklamtarifo

por pli ampleksaj anoncoj:

plena paĝo 1 800 b.fr.;  
duona paĝo 900 b.fr.;  
kvarona paĝo 500 b.fr.,  
(respektive 100, 50 kaj 30 nederlandaj guldenoj), kun ĉiam validaj rabatoj de 25 elcento por membroj de IKEF, kaj ĉiam tri aperoj de la sama anonco en sinsekvaj kajeroj por la prezo de du tiaj aperoj.

Varbi reklamanoncojn por nia organo estas tre trafa metodo subteni v i a n organizaĵon!